


Ron GLOSSOP Usono Pacbatalanto



Ronald Glossop naskiĝis je la 17-a de Februaro 1933, en Aurora, Illinois, 55 km okcidenten de Chikago. Tio okazis ok minutojn post la naskiĝo de lia identa ĝemelfrato Donald, kiu akiris la personan nomon de la patro. Fratino Carol naskiĝis en 1936. La gepatroj loĝis en Aurora ĝis la patro mortis en 1980 kaj la patrino en 1993.

Post la diplomatiĝo de la duagrada lernejo, la ĝemeloj iris en malsamaj direktoj, Donald al la Illinois Institute of Technology en Chikago por iĝi inĝeniero kaj Ronald al Carthage College en okcidenta Illinois por iĝi instruisto pri matematiko. Tie li interesiĝis pri filozofio post unu kurso en la unua jaro. Dum kelkaj jaroj li ekpensis pri la ebleco iĝi pastro en la Luterana eklezio, sed fine decidis iĝi Unitariano kaj profesoro pri filozofio. En 1955 li diplomitiĝis summa cum laude ĉe Carthage College. En 1958 li edziĝis al Audrey Lutz el Sankta-Luiso, Misurio. En 1960 li doktoriĝis ĉe Vaŝingtono Universitato en Sankta-Luiso.

Li instruis filozofion dum unu jaro en Boise, Idaho kaj dum kvar jaroj en Portland, Oregono. Filo Kent naskiĝis en 1961. En 1965 li moviĝis al Southern Illinois University ĉe Edwardsville (SIUE) apud Sankta-Luiso. Li instruis tie dum 35 jaroj ĝis la emeritiĝo en 2000.

Kelkaj liaj artikoloj (plej ofte pri la filozofio de David Hume) aperis en profesiaj revuoj, kaj Glossop helpis fondi asocion pri la filozofio de Hume. En la jaro 1974 aperis lian unuan libron, *Philosophy: An Introduction to Its Problems and Vocabulary*. Tamen en 1972, pro la milito en Vjetnamio li komencis repensi pri la temo pri kiu li debatis en la jaro 1947, ke la Unuiĝintaj Nacioj devus esti transformataj al federala monda registaro. Li decidis iom ŝanĝi la fokuson de sia instruado al la problemo de milito kaj paco kaj al aliaj tutmondaj problemoj. Li kredis ke la homaro ne povos akiri pacon ĝis ili kreos demokratian mondfederacion. Pro tio ĉiuj homoj devus konscii ke ili estas civitanoj de tutmonda komunumo. Li instruis klason kun kolegoj de aliaj fakoj pri milito kaj paco, kaj post kelkaj jaroj li verkis lernolibron kun la titolo *Confronting War*. La unua eldono estis publikigata en la jaro 1983, la dua eldono en 1987, la tria eldono en 1994, kaj la kvara eldono en 2001. Li ankaŭ verkis libron *World Federation?* kiu aperis en la jaro 1993. *Monda Federacio?*, la Esperanto traduko farita de Johano Rapley, estis publikigata en 2001.

Grava ŝanĝo en la vivo de Glossop okazis en la jaro 1978. Li havis la ideon rilate al

mondcivilitaneco ke devus esti unu desegnita facile lernebla lingvo por la tuta mondo, sed tio estis nur nebula ideo ĝis kiam li aŭdis ke tia lingvo nomita Esperanto jam ekzistas! Li legis iom pri ĝi kaj decidis ke li devus lerni ĝin. Feliĉe lia kolego Rino Cassanelli en la fakultado de fremdaj lingvoj konsentis instrui unujaran eksperimentan kurson en kiu Glossop povis esti studento. Kvazaŭ-mirakle la konata Esperantisto Pierre Janton tiam venis al SIUE kiel vizitanta profesoro. Li ne venis por instrui Esperanton, sed nur unu studento registris sin por unu kurso kiun Janton devis instrui. Sekve estis ŝanĝo kaj Janton instruis la Esperanto-kurson dum dek semajnoj. Li kuraĝigis Glossop mem instrui Esperanton. Cassanelli instruis la kurson dum dua jaro kaj poste Glossop komencis instrui ĝin en la jaro 1981. Tiam ĝi ne plu estis eksperimenta kurso.

Glossop eltrovis ke multaj studentoj en la Esperanto-kurso jam studis aliajn fremdajn lingvojn. Li opiniis ke Esperanto devus esti la unua fremda lingvo, kaj feliĉe li povis trovi elementan lernejon kie li povis instrui la talentajn gelernantojn tri fojojn semajne. Poste li instruis Esperanton en aliaj elementaj lernejoj kaj en mezgradaj lernejoj krom en la universitato.

Iom post iom li pli aktivis en la Esperanto-movado. En 1984-85 du el liaj artikoloj aperis en la Esperanto-revuo Simpozio. Li partoprenis UK-on en 1984 (Vankuvero) kaj la konferencon de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) en 1991 kie li iĝis Vic-Prezidanto dum tri jaroj. Lia unua artikolo en la Internacia Pedagogia Revuo (IPR) "Esperanto Kiel la Unua Fremda Lingvo" aperis en 1992. Li prelegis ĉe la Internacia Kongresa Universitato (IKU) pri "Nova Monda Ordo: Du Usonaj Vidpunktoj" en 1992 en Vieno kaj pri "Milito Kiel Politika Problemo" en 1994 en Seulo. Aliaj artikoloj en IPR estis "Ĉu Vi Estas Mond-Civitano?" kaj "Ferma Parolo por la 28-a Konferenco de ILEI" en 1994, "Preter Naciismo al Paca Tergloba Komunumo" (1998), "Pri Nova Epoko" (2001), "Kial Oni Devus Lerni Esperanton" kaj "La Historio de Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo" en 2003, "Edukado al Paco" (2004), "La Kulturo de Esperanto" (2005), "Esperanto kaj Mondcivilitaneco" (2006), kaj "Raporto pri Instrua Vojaĝo al Ĉinio" (2010). Aliaj artikoloj kiuj aperis en Esperanto-revuo estas "La Graveco de la Nova Konstanta Internacia Krimtribunalo" en Jura Tribuno Internacia (2003), "La Politikaj Aspektoj de Tutmondiĝo" en Kontakto (2006), kaj "La Signifo de la Dudek-Unua Jarcento" en la nurreta revuo Teleskopo (2009). Ofte la eldonitaj artikoloj originale estis prelegoj.

Profesoro Glossop ankaŭ verkis multajn anglalingvajn artikolojn pri paco kaj aliaj internaciaj problemoj sed ankaŭ pri Esperanto kiel "Does Having a Common Language Reduce the Likelihood of War?" en Proceedings of the 4th Annual Conference on Language and Communication (1986), "Language Policy and a Just World Order" in Alternatives (1988), "International Child-to-Child Correspondence Using Esperanto" en Gifted International (1988), & "Integrating Language Study & Global Education" kaj "A Brief Response to Kurt Müller" en Kurt E. Müller (red.), Language Status in the Post-Cold-War Era (1996).

Ekde la jaro 2001 Glossop estas Direktoro de la tutmonda Esperanto-organizo Infanoj ĉirkaŭ la Mondo, retejo ĉe . Li estas Prezidanto de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, retejo . Li estas kasisto de la Esperanto-Asocio de Sankta-Luiso, retejo .

Profesoro Glossop ankaŭ aktivis en diversaj organizaĵoj kiel Civitanoj por Tutmonda Solvoj, Usona Asocio por la Unuiĝinataj Nacioj, Filozofoj Koncernaj pri Paco, Unitarian-Universalistoj Esperantistoj NiKune (UUEN), kaj Unu Mondo. Li estas Honora Membro de Esperanto-USA kaj de Rotario Internacia.

Por la Panteono de edukado.net sin prezentis R. Glossop en novembro 2010.